

# HEROLDO

Eldono : Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstraat 3, Brussel-West.  
Redakcio-Administracio : T. Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Ned.  
Jarabono : Belgujo 165 fl., Nederlando 9 gld.; cetera laŭ aparta tarifo.  
(Abonantoj por 1948 ricevas premie la numerojn de okt.-decembro 1947.)  
Anoncoj : 25 komencitaj vortoj b. fl. 25.—, gld. 1.25 aŭ 6 resp.-kuponoj.

## DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 18 (1077)

FONDITA EN 1920 — 23-a JARKOLEKTO

1 Decembro 1947

## Onidiroj pri IALA.

Kial Nacisocialismo donis sian subtenon al Occidental?

Persistas la onidiroj pri la intenco de IALA, per unu el la skemoj de ĝi elaboritaj komenci, post nelonge, publikan konkuradon kontraŭ Esperanto kaj la esperantistoj. Estas por ni malfacile tion kredi, ĉar tio ne nur estus entrepreno tute senŝanca, sed ĝi ankaŭ estus kontraŭ la originaj planoj de IALA mem. Per tia paŝo IALA descendus de sia alta trono de nepartia mondlingva esplorado, kiu en la pasintaj du jardekoj plenigis nin per tiom belaj esperoj por la estonteco, kaj ĝi mem fariĝus partio.

Tamen la onidiroj ĝis nun ne estas dementitaj. Ĉu do vere IALA rezignus sian altan taskon de scienca esplorado, por riski entreprenon, kies senŝanceco jam pruvis la fiasko de multaj similaj entreprenoj en la pasinteco?

Kiom da projektoj de lingvo internacia jam estiĝadis dum la vivtempo de Esperanto! Ili aperis, faris iom da bruo, eventuale akiris kelkajn adeptojn, sed cetera ili nur konfuzis la publikon kaj estis akvo sur la muelilojn de tiuj, kies plej granda deziro estas dismueli kaj frakasi la mondlingvan movadon. Kutime tiuj projektoj malaperis senbrue, jam mallongan tempon post la apero, kaj restis nur po unu plia nomo de aŭtoro kaj de projekto, kiel la 1000-a aŭ 1001-a sur la longa listo de l' fiaskejoj. — aŭ ili vegetadis dum kelkaj jaroj, aŭ eble ankoraŭ estas vegetantaj, sed iun atentindan nombron da adeptoj por la daŭro neniu el ili atin-

\*\*\*\*\*

### VERDSTELAJ RADIOJ

— UEA atingis la 30.9.1947 : 13.953 membrojn (el kiuj 6846 individuaj); la analogaj ciferoj por 30.9.1946 estis : 13.010 (5629).

— Gis 1.11.1947 aliĝis al la *Universala Kongreso en Malmö* 202 personoj el 19 landoj. La Esperanto-klubo de Malmö havas 139 membrojn.

— La 21-a Kongreso de SAT okazos venontjare de 31.7. ĝis 5.8. en Amsterdam. Kongresotizo ĝis 30.4.48 : 7 gld. (geedzaj 12 gld.), por ne-SATanoj 10 (17.50) gld. Adreso de la sekretariino : H. Oudenhooven-Bisshoff, Besteveerstr. 127-3, Amsterdam W., Nederlando.

— La 28-a Kongreso de FLE okazos la 27.-29.3.1948 en Amersfoort. La OKK luis la plej grandan salonon de la urbo. Adreso de la sekretario : P. Poort-Procece, Vermeerstr. 16, Amersfoort, Nederlando.

— Brita kompanio Empire Film Productions eldonis 35 mm-filmon pri la problemo de internacia lingvo. La prezento de la filmo, kiu bonege elmontras la utilon de Esperanto, daŭras 20 minutojn, kaj ĉiu sekundo estis tiom interŝpela ke mi senhezite profetas komercan sukceson (konstatas W. A. Gething en « The British Esperantist »).

— En raporto pri debatoj pri la provizora budĝeto de la nederlanda Instruanda Departemento oni povis legi : « De diversaj flankoj oni postulis la enkondukon de Esperanto kiel deviga fako. Oni deziris aŭdi la opinion de la ministro. Tamen pri tio la opinioj estis diferencaj, kaj oni preferis plivastigi la instruadon de la angla lingvo. » Raporto cetera tre nepreciza. « Oni » kredeble estis diversaj parlamentanoj. Kaj « pri tio » verŝajne signifas « pri la enkonduko de Esperanto ».

— Por la tuta franca sudzono de Germanujo fondiĝis Esp.-asocio « Kompreno », kiu ricevis licencon de la franca militista registaro. Adreso : Postfach 19, (17 b) Konstanz a.B.

— La politikaj partioj (socialdemokrata kaj agrara) en hungara komunumo Pest-hidegkut decidis kunhelpi ĉe la arango de Esperanto-kurso.

(Vidu pĝ. 2, kol. 4.)

gis. Esperanto, kiel sola el ĉiuj, transpasis la stacion de nura projekto kaj fariĝis vivanta lingvo jam de kvar jardekoj.

Oni povus diri ke, ju pli multe da novaj projektoj, des pli granda honoro por la sola postvivanta kaj vere vivanta Esperanto, kaj oni povus supozi ke la publiko finfine konvinkigis pri la senutileco, eĉ malutileco, de ĉiam novaj « lingvoj internaciaj » kaj « mondlingvoj » aŭ « mondhelp-lingvoj », kaj ke ĝi — la publiko — aliĝus kun ĉiuj standardoj al tiu sola kiu persistadis. Sed la publiko nur malrapide lernas el la spertoj, kaj tiuj, kiuj ne volas ke la mondo interkompreniĝu, volonte eluzas la situacion por miskreditigi la tutan mondlingvan movadon.

Cetera neniu estis tiel senhonta por konfesi tion, kiel la ĝis nun plej granda malamiko de la homaro kaj de nia afero : nacisocialismo. Antaŭ ni kuŝas fotokopio de artikolo aperinta en « Der Angriff » (La Atako), organo de « Germana Laborfronto », la 16-an de junio 1944. La artikolo havas la titolon : « Negro-Angla » fariĝu « mondlingvo ». Per « Negro-Angla » oni celas la strangan misprodukon de la angla « lingvopsikologo » Ogden, kiun — la projekton kaj ĝian aŭtoron — la nomita artikolo prave ridindigas. Sed tio, en rilato kun nia temo pri IALA, ne interesas nin. Kio nin interesas hodiaŭ, tio estas la malkaŝa konfeso de l' nacisocialismo, en la nomita artikolo, ke ĉi tiu reĝimo, malpermesinte Esperanton, dum iu tempo tamen permesis kaj eĉ subtenis (!) la Occidental-organizaĵon. Ĉu por akceli la mondlingvan movadon? Kontraŭe! Por ridindigi kaj, fine, ruinigi ĝin, — almenaŭ oni esperis sed, dank' al la esperantistoj, ne sukcesis ruinigi ĝin.

Kion vi, okcidentanoj, diras pri tiu speciala « honoro », esti subtenita, dum iu tempo, de la plej fanatika malamiko de nia komuna (!) afero, kun la sola intenco, ĉi tiun aferon ruinigi?

Sed legu mem la jenan alineon el la nomita artikolo :

La nacisocialista registaro jam baldaŭ post la ekpreno de la potenco senceremonie malpermesis la tiam ekmodiĝintan artlingvon « Esperanto ». Ankaŭ « Ido », nemultvalora konkurenckonstruo, kiu en tiu tempo verdire jam estis bankrota, estis malpermesita konsekvence. Kompreneble ankaŭ « Occidental », kiu ĝuste tiam aperis kiel nova mondlingvo, apartenas al la sama kategorio, kvankam ĝi ne havas nomindan anonon. Se, malgraŭ tio, certaj instancoj en Vieno komence ne malhelpis kaj portempe eĉ subtenis la tian Occidental-organizaĵon, tio okazis kun difinita intenco. Per tio ke, kiel sekvo, certaj rondoj surtroniĝis nek Esperanton, nek Idon, sed ĝuste Occidental'on, kaj ĝin propagandis kiel internacian helplingvon, per tio nome oni donis la mortpikon al la tuta mondlingva movado. Pro la freŝa-gaja apudekzisto de tri mondlingvoj, kiuj nun konkuris en eksterlando, la tuta movado fakte atingis la stacion de l' sensencoco kaj, sekve, de l' ĝenerala ridindeco. Ĉu al la germana afero oni povus fari pli bonan servon?

### Per Esperanto al la Paco!

Sub tiu ĉi moto okazis la 17.-19.10., en Kufstein la unua postmilita Aŭstria Esperanto-Kongreso, kun partopreno de tricento da delegitoj kaj unuopaj membroj de la supertendenca Aŭstria Esperantista Federacio kaj de la Societo de la Amikoj al Esperanto. La poŝto stampis la dumkongresajn poŝtaĵojn per speciala stampilo, kiu montris kastelan turon, la tagan daton kaj la vortojn : OSTERR. ESPERANTO-KONGRESO 1947, PER ESPERANTO AL LA PACO (DURCH ESPERANTO ZUM FRIEDEN), KUFSTEIN 1.

Dum la kongreso estis elektataj la novaj estraroj por la nomitaj federacio kaj societo, kaj akceptataj kelkaj rezolucioj, inter ili deklaracio kontraŭ ĉiuspeca faŝismo kaj por libereco, pacamo kaj demokratio. Okazis katolika diservo, kaj fakkunsidoj de katolikaj kaj de laboristaj esperantistoj; la laste nomitaj decidis formi laboristan Esp.-frakcion de AEF. Belega ekskurso al la impona Saiser-valo finis la neforgeseblan kongreson, kiu denove montris la ĝustecon de la aŭstria organizo : ne evitema neŭtraleco, sed kurage-aktiva superpartieco kun plena libereco por ĉiuj opinioj, kondiĉe kaj rezulte de vere esperantista unueco.

### Restarigita militviktimo.

Ĉiu samideano, kiu antaŭ la milito iam vizitis la Esperanto-Domon en Arnhem (Nederlando), certe rememoras « Esperantolaaŭ », la aleon kondukantan de la larĝa trafikvojo al la ĉarma vilao, en kiu oni pasigis agrablajn libertempojn, kune kun gesamideanoj el multaj landoj. Inter la « viktimoj » de la milito estis ankaŭ la nomtabulo « Esperantolaaŭ », starinta ĉe la komenco de la aleo. Tial decidis Arnhem Esperantista Kunlabora Komitato, konsistanta el reprezentantoj de la lokaj Esperanto-grupoj, starigi novan foston kun nomtabulo. En-kaj eksterlandaj gesamideanoj donacis la necesan monon, kaj la 4.10. povis okazi la inaŭguro de la nova tabulo, en ĉeesto de multaj gesamideanoj kaj invititoj; inaŭguran paroladon faris urba skabeno s-ro Klompé, kaj s-ro Makkin, sekr. de la oficejo « Esperanto ĉe la scienco », paroladis pri la 60-jara jubileo de Esperanto.

Novaj laboristaj Esperanto-kursoj okazas en jenaj nederlandaj lokoj : Aalsmeer, Amersfoort (43 p.), Amsterdam (38), Apeldoorn (20), Arnhem (23), Beverwijk (50), Brunssum (24) kaj Bussum (20).

## Ĉiutaga Esperanto - elsendo nun ankaŭ el Parizo

(Vidu sub la Radio-rubriko sur paĝo 4.)

La substrekoj (kursivo) estas de la nacisocialista ĵurnalo mem.

Ni kredas ke ni ne povus pli klare ol la citita artikolo elmontri la kapran servon, kiun niaj duonfratoj sur la mondlingva tereno faras al nia komuna afero, kiam ili provas, propagandi siajn apartajn projektojn, kontraŭ Esperanto kaj la esperantistoj, ĉe la neorientita aŭ nesufiĉe orientita publiko.

Komprenu bone : ne temas ĉi tie pri la interna valoro aŭ senvaloreco de la diversaj projektoj. Tio estas alia afero. Iu projekto certe povas, en detaloj, superi alian projekton, kaj Esperanto ne estas la solvo « sine qua non », t.e. ĝi ne estas tia, ke ĝi ne povus, en detaloj kaj entute, esti superata de alia projekto. Eĉ la — laŭ la artikolo en la nazi-ĵurnalo « nemultvalora » — Ido havas siajn bonajn flankojn, ankaŭ Occidental posedas multajn avantaĝojn; aliajn taŭgajn detalojn prezentis Medial, aliajn Novial aŭ Latino senfleksia, kaj sendube ankaŭ ĉiu el la diversaj skemoj de la IALA-ellaborajo per si mem estus kapabla plenumi la rolon de mondhelpingvo. Cetera ĉiu intereso havas, kaj havu, planan liberecon klopodi por kiel eble plej taŭga aŭ kiel eble plej perfekta solvo de la mondlingva problemo. Nur oni devas ne malatenti la aksiomon ke — ĉe la praktika aplikado — « pluraj lingvoj internaciaj = neniu lingvo internacia », kaj ke tiu aksiomo surmetas al ni la devon, dum la daŭro de la propaganda periodo, ne konfuzi la publikon per la antaŭtempa reklamado de du, tri aŭ pli multe da mondlingvaj projektoj samtempe. Alie ni, je la fino, eventuale mem atingos nur tion, kion nia plej danĝera malamiko, la nacisocialismo, malgraŭ siaj potenterimedo, malgraŭ malpermeso, persekutado kaj teroro, ne sukcesis atingi, nome la disbaton kaj ruinigon de la tuta mondlingva afero.

Ankoraŭ ni esperas, ke ankaŭ IALA, konvinkita pri tio sama, agos konforme al la intereso de nia movado, kaj ke la onidiroj restos nur ... onidiroj.

T. J.

### Malgranda kaŭzo — granda efiko.

En sia broŝuro pri la internacia armeo (vidu la artikolon en Heroldo n-ro 10 de 15.5) proponas la aŭtoro, pensita husara kapitano van den Berg van Saparoea, la enkondukon de Esperanto kiel lingvo de tiu internacia armeo. En piednoto li rakontas la jenan epizodon, kiu instigis lin al lia propono :

Krom la nomo, mi scias nenion vorton de tiu ĉi mondlingvo, tiel ke oni ne asertos ke mi volas propagandi por ĝi. Sed kiam lutage en Arnhem mi eniris cigarbutikon, okazis tie flua interparolo inter la butikisto kaj kliento en lingvo por mi tute nekomprenebla. Post foriro de la kliento mi eksciis ke li estis ĉeĥo, kaj mian demandon, ĉu do la butikisto scias ĉeĥe, li respondis : « Certe ne, sinjoro, ni ambaŭ parolis Esperanton. » Sed se ĉeĥo kaj nederlandano, nacianoj kun tiel diferencaj prononcoj, tiel facile povis interkompreniĝi per Esperanto, tio ja estis konvinka pruvo, ke tiu ĉi mondlingvo povas esti lernata de ĉiu popolo kaj sukcese uzata en aliaj landoj, kaj tial mi opinias ke Esperanto estas la donita lingvo por la armeo de UNO.

### Fatalo evitata per Esperanto.

Germana samideano Franz Mattern, el Zoppot (nun pola urbo Sopot), skribis al belga korespondanto la jenan epizodon :

Dum la lastaj milittagoj en Zoppot, marmarborda banloko, antaŭurbo de Danzig, en la domo de miaj gepatroj mortis je malgranda, preskaŭ nevidebla vundo rusa soldato. Kiam envenis liaj kamaradoj, ili supozis krimon. Ili kaptis kelkajn personojn por vengi kaj intencis puni ankaŭ per bruiĝo de multaj domoj. Mi aŭdis la laŭtan interparoladon, kaj subite mi sentis min kvazaŭ pelata al la loko de la ekscito. Mi kurage kaj simple demandis : « Ĉu estas inter vi esperantisto? Mi povus klarigi la veron. » Dank' al Dio, soldato antaŭvenis : li estis esperantisto. Mi trovis la gustajn vortojn, kaj oni kredis min. Sen Esperanto multaj senkulpaĵoj homoj estus mortigitaj, kaj domoj detruitaj. Dank' al nia admirinda Esperanto ni ĉiuj savigis.

### Profeto ne estas estimata hejme.

Tamen pri Heroldo estas escepto : Dum la pasinta abonperiodo, Hago estis la urbo kun la plej multaj Heroldo-abonantoj (40). Ĉu interesas ciferoj pri aliaj urboj? Dua estis Vieno kun 34, tria Londono kun 31 abonantoj. Sekvis Amsterdam kun 28, Rio de Janeiro 26, Kopenhago 25, Reykjavik 21, Praha kaj Rotterdam po 17, Milano 16, Hradec Kralové kaj Stokholmo po 14, Romo 12, Brno, Haarlem, Parizo kaj Ljubljana po 11, Los Angeles, Napolo, Novjorko kaj Zagreb po 10, aliaj malpli ol 10. Do, Hago, kie troviĝas (en ĝia antaŭurbo Scheveningen) la redakcio kaj administracio de Heroldo, tenas la rekordon. Kiu klopodos rompi ĝin? (La nomitaj ciferoj ne enhavas tiujn abonantojn, kiuj ricevis Heroldon pro sia aktiva membreco ĉe U.L.)

**Tamen mi aprobas la rekunigon.**

En « Internacia Kulturo », D-ro Ivo Lapenna publikigis dialogon, kiun li havis kun s-ro Hans Jakob. Laŭ la deklaroj de s-ro Jakob, la Komitato de UEA (nova) ne rajtas disponi pri la havaĵo de UEA (malnova); nek pri unu skribmaŝino nek pri unu kraĵono, ĝi ankaŭ ne rajtas nomi la redaktoron de sia propra oficiala organo, kaj tiu stato daŭros kvin, ses aŭ pli multe da jaroj, ĝis UEA ricevos heredaĵon, pri kiu oni ne rajtas scii la grandecan de la sumo nek la nomon de la postlasinto. Fakte, « iom » stranga siŭacio!

URTIKO.

**La Kongreso de la Esperantistaj Skoltoj**

malfermiĝis la 10-an de aŭgusto je la deka kaj duono. Ĝia organizinto estis la ĉefo Tixier el Arras, juna esperantisto kiu alportas samgrade al skoltismo kaj al Esperantismo sian ardon de juneco.

Tiam ĵus alvenis el Rouen du grandaj aŭtobusoj kun esperantistoj el Normandio kiuj deziris partopreni la kunvenon kaj viziti la tendaron. Aliaj « palvizagaĵoj » alvenis el Arras, el Pariza regiono, eĉ el Tuluza regiono. Sed ne kreu de ne nur « palvizagaĵoj » samideanoj ĉeestis! Ni vidis gravan delegitaron el Italujo, alian el Svedujo; britoj ĉeestis, hungaroj; aliaj venis el Nederlando, eĉ el Maroko.

Ĉefo de la komandostabo salutis la kongreson nome de Generalo Lafont; poste okazis salutparoloj de skolfrato Alex McKenzie el nordorienta Britujo, Chayon el Marakeŝo, D-ro Vito de Benedetto el Italujo, Prezidanto de l' francaj katolikaj esperantistoj, skolfrato Jerrefalk el Eskilstuna en Svedujo.

La vera kunveno estis malfermata per parolado de ĉefo Tixier, kiu poste legis salutleterojn kaj proponis ke la prezidanteco estu donata al D-ro Vito de Benedetto. Ĉi tiu diris ke morala prezidanteco devus esti donata al ĉiuj nacioj, kiuj estas reprezentitaj, kaj aktiva prezidanteco al skolfrato Tixier. La ĉeestantaro aprobis.

Estis tiam la labortempo de la kongreso, gvidata de skolfrato Tixier. Unue oni revizis la celojn de la Skolta Esperanta Ligo (SEL). Post diskutado estis firme indikate ke SEL havas kiel celon la arigadon, per Esperanto, de la skoltaro, kiu agadas laŭ la principoj de Baden Powell.

Posttagmeze la laboroj daŭris, kaj kun goĝo ĉiuj estis informataj pri alveno de letero de la malnova komitato de SEL. Tiel la iamaj penadoj povos esti religataj al tiuj, kiuj estas de nun antaŭvidataj.

Nun elĉerpi el tio instruojn por la estonteco, estos la plej taŭga maniero por vivantigi la memorojn de la kongrestago de l' esperantista skoltismo.

SEL devas vigle revivi en ĉiuj landoj, kie ĝi agadis antaŭ la milito, kaj disvolviĝi en aliaj landoj. Tio kuŝas en la manoj de l' esperantistaj skoltoj kiuj devas streĉi sian volon por atingi tiun celon.

Sed tiu laboro de rearigado ne devas forĵeti la de nun fendaĵajn laborojn; la Jamboreo de l' Paco vidis Esperanton uzatan oficiale, vidis nian lingvon en la vivo mem; ni do devas pensi al la venonta jamboreo, dum kiu Esperanto devos ricevi pli gravan atenton. Tio kuŝas samgrade en la manoj de l' esperantistaj skoltoj kaj en tiuj de ĉiu esperantisto, kies devo estas helpi SEL-on sur tiu vojo.

Antaŭe oni devas provi plenumi ion por uziĝi Esperanton en la internaciaj kunvenoj de l' skoltismo, kiel en la venonta skandinavia kunveno internacia de la roverej-skoltoj.

Pro tio, ke skoltismo konsistas el junuloj, el ĉiuj landoj kiuj morgaŭ havos, eble, en mano la gvidilojn de gravaj postenoj, ni devas enpenetriĝi Esperantismen en ĝi. Skoltismo kaj Esperantismo havas la saman pacan, idealan celon; ili devas iri man-ĉe-mane, la du movadoj grave profitos de tiu kunagado, por la bono de la paco inter la homoj. — moto kiu gvidis la Jamboreon de Moisson 1947.

R. F.

D-ro W. Solzbacher :

**UNO kaj la lingva problemoj**

(Fino.)

Ĝis nun la novaj aparatoj estas propraj de la IBM-Kompanio (International Business Machines = Internaciaj Oficejaj Maŝinoj), kiu ankaŭ liveris al UNO la Filene-Finlay-tradukilojn (laŭ la telefonsistemo). La aparatoj oficiale nomiĝas (laŭ la teksto presita sur la baterio) « IBM Wireless Translator System embodying Filene-Finlay patents » (IBM Senfadena Tradukil-Sistemo utiliganta la Filene-Finlay-patentojn). La patentoj estas usonaj, britaj, francaj kaj svisaj.

Nuntempe UNO nur « luprenas » la aparatojn de IBM, pagante 80 centojn por ĉiu aparato kaj ĉiu semajno. Por 1800 tio do estas 1440 dolaroj. La Ĝenerala Kunveno mem devos decidi, ĉu ĝi alprenos la radiosistemon daŭre. Tiukaze UNO intencas aĉeti mil aparatojn (por prezo ankoraŭ ne konata) kaj lupreni aliajn laŭbezono.

La fakto, ke la aparatoj ebligas uzon de sep lingvoj, dum la telefonaparatoj de la sama firmo havas nur ses poziciojn, indikas ke oni enalkulas la eblecon, ke UNO iam havos ses oficialajn lingvojn anstataŭ la nunaj kvin (unu pozicio sur la aparatoj ĉiam alportas la paroladon en la originala lingvo de la parolanto, kiu ajn ĝi estu). Kiu lingvo do estos la sesa oficialigota?

Cetere la « samtempa » traduksistemo troviĝas sur la tagordo de la nuna Ĝenerala Kunveno sub n-ro 16 (« Procedo kaj organizo de la Ĝenerala Kunveno »). La ĝenerala sekretario de UNO, s-ro Trygve Lie, prezentos raporton pri ĝi. En decembro 1946, kiam sufiĉe forta kontraŭstaro kontraŭ la sistemo rimarkiĝis, ekzemple de la franca delegitaro, la Ĝenerala Kunveno prokrastis decidon. Mi havas la impreson, ke oni nun alprenos la sistemon, ĉar ĝi ŝparas tempon, kaj tio ŝajnas esti la plej urĝa afero por multaj delegitoj. En Lake Success, ejo de la UNO-Sekretario, mi rimarkis antaŭ nelonge, ke oni instalas telefonŝnurojn kaj tradukkaĝojn en preskaŭ ĉiuj komitatĉambroj. Lastjare oni havis tian instalaĵon nur en ĉambro 4.

La 22-an de septembro, kiam mi ĉeestis la Ĝeneralan Kunvenon de UNO en Flushing Meadows, oni ne povis plene observi la malfacilaĵojn de la sistemo, ĉar ĉiuj paroladoj estis skribe preparitaj, kaj la tradukistoj povis prepari sin per legado de la manuskripto. Kompreneble en tia kazo buŝa traduko estas tute necesa, ĉar estus same bone, presigi aŭ multobliĝi la paroladon en diversaj lingvoj kaj disdoni ĝin al la delegitoj. Se konferenco konsistus nur en legado de preparitaj manuskriptoj, la konferencanoj eĉ povus resti hejme kaj ricevi la tekstojn per la poŝto! La vera signifo kaj intereso de konferenco troviĝas en la tuja, nepreparita interŝanĝo de opinioj kaj propo-

noj, kun demando kaj respondo, atako kaj defendo, argumento kaj kontraŭargumento, batalo, kompromiso kaj fina interkonsento. Dum tiaj debatoj kaj oratoraj dueloj, ne dum la legado de pretaj manuskriptoj, okazas la pli granda parto de miskomprenoj kaj fuŝaj tradukoj. Ankaŭ en tiaj okazoj oni plej bone vidas, ke tiuj, kiuj rajtas paroli en sia propra lingvo, ĝuas maljustan supercon kompare al tiuj, kiuj estas devigataj pene serĉi la ĝustajn vortojn kaj frazojn en fremda lingvo.

Pro kaŭzoj, kiujn mi montris en mia antaŭa artikolo, eraroj kaj neklaraj tradukoj estas multe pli oftaj en la « samtempa » ol en la « postparolada » traduksistemo. Kiam, en la mezo de septembro, mi partoprenis konferencan en la UNO-Sekretariejo, mi denove konstatis tion. La konferencanoj preskaŭ ĉiuj estis usonanoj; sed unu el la prelegantoj, s-ro Jean Benoit-Levy, direktoro de la filmfako de UNO, parolis france. Por demonstraci la funkciadon de la Filene-Finlay-sistemo, interpretisto donis anglan tradukon samtempan. Parolante malrapide, klare kaj logike, s-ro Benoit-Levy liveris veran modelon de parolado facile tradukebla. Tamen la traduko enhavis multajn erarojn, eĉ stultajn erarojn. S-ro Benoit-Levy ekzemple uzis la vorton « thermomètre ». En angla lingvo ĝi estas « thermometer », en Esperanto « termometro ». Tre simpla afero, ĉu ne? La interpretisto tamen ŝajnis havi la impreson, ke la parolanto diris ion similan al « terme-au-maître » (tia vorto fakte ne ekzistas en franca lingvo) kaj tradukis « master example » (majstra ekzemplo). Kiam la sekvanta frazo diris, ke la termometro « mezuras la temperaturon », la interpretisto estus devinta korekti sian antaŭan tradukon, sed li ne faris tion. En « postparolada » traduko tia eraro estus apenaŭ ebla, ĉar eĉ se unue okazus la sama miskompreno, la sekvantaj frazoj klarigus la veran sencan al la tradukisto.

En la sama konferenco ankaŭ okazis treege interesa raporto de s-ro Peter Ayleen, direktoro de la Radiofako de UNO. Li menciis programojn en diversaj lingvoj kaj la malfacilaĵojn, kiujn la multlingveco prezentas. Poste iu sinjorino demandis s-ran Ayleen, ĉu la uzo de internacia lingvo ne estus la plej bona solvo de tiuj malfacilaĵoj, kaj ĉu UNO vere neniel atentus tiun problemon. S-ro Ayleen respondis, ke li « vere deziras, ke iu faru ion pri tio », kaj ke alpreno de internacia lingvo treege faciligus lian laboron kaj tiun de UNO ĝenerale. Bedaŭrinde mankis tempo por daŭrigi la demando-kaj-respondo-ludon. Sed la vortoj de tiu eminenta UNO-oficisto montras, ke la neceseco de internacia lingvo fariĝas pli kaj pli evidenta. La Esperanto-movado devas pruvi en praktika kaj efika maniero, ke la uzo de Esperanto estas simpla kaj racia solvo de la problemoj de internacia lingvo.

**Hungara Esperanto-mozaiko.**

— Gimnazia profesoro D-ro J. Kondor elmetigis en la gimnazioj de la urbo Nyiregyhaza alvokojn pri Esperanto, ankaŭ en la stacidomo. En gazetoj regule aperas artikoloj. Kelkdeko da gimnazianoj komencis lerni.

— En vesperlernejo de la urbo Budapeŝt komenciĝis kurso de s-rino S. John, aranĝita de la Popolkleriga Komitato.

— La afiŝoj kaj programoj de la 8-aj Landaj Protestantaj Tagoj anoncis oficiale la okazon de konferenco de hungaraj membroj de Kristana Esp.-Ligo. Ĝi okazis la 30-10, kiam em. univ. prof. D-ro Nyireő paroladis pri historio de mondlingvo kaj evoluo de Esperanto. Oni laŭlegis leteron de evangeli episkopo, laŭ kiu la episkopa konsilantaro rekomendis al la ekleziaj mezlernejoj la akcepton de Esperanto kiel nedeviga studobjekto. Similan rekomendon faris unu el la reformitaj episkopoj en Hungarujo. Alia rifuzis pro troŝarĝo de la lernantoj.

— La 9.9. aranĝis Hung. Esp. Soc. Laborista sukcesan kulturfeston okaze de la 30-a datreveno de la fondo de Sovetio.

— En Pesthidegkut la politikaj partioj kunhelpis en la aranĝo de Esperanto-kurso. La loka social-demokrata partio invitis s-anon P. Balkanyi fari paroladon en tri partigrupoj; la loka agrara partio invitis s-anon I. Csurgay.

Universala Ligo intencas, en 1948 denove eldoni « La Praktikon ». Tiuj aktivaj membroj de UL, kies abono je Heroldo finiĝos je 31.12.1947, kaj kiuj poste deziras daŭrigi la abonon, pagos 20% malpli ol la abonkotizoj indikitaj en la listo en n-ro 16, do por la tuta jaro 1948: b. fk. 132, gld. 7.20, angl. ŝil.14/-, dol. 3.20, ktp.



Esperanto-stando en Ostendo.

La urbeŝtaro de Ostendo (Oostende, Belgujo) disponigis al la loka sekcio de Flandra Esperantista Ligo standon ĉe la tiera Internacia Foiro, la 19.7-17.8. La standon vizitis pli ol 15 000 personoj, inter ili svedoj, francoj, britoj kaj nederlandanoj. 300 vizitintoj donis sian adreson por ricevi pliajn informojn pri Esperanto.

Ankaŭ ĉe la Internacia Foiro de Gento (Gent, same en Belgujo), kiu okazis pli poste, estis Esperanto-stando, organizita de la diversaj lokaj grupoj. Oni vendis librojn kaj povis, en oktobro, komenci novan kurson.

Nia kliŝo (el « Flandra Esperantisto ») montras la Ostendan standon.

**Tra la Esperanto-gazetaro.**

Literatura Mondo klopodas teni nivelon. Aperis la tria ampleksa numero, kaj ĝi estas minimume same leginda kiel la du antaŭaj. Ni ne aŭdas, ĉu la esperantistaro subtenas ĝin sufiĉe, sed ni esperas tion. Trafa satiro de Lajos Nagy « La egipta skribisto »; Raymond Schwartz jetas « salon kaj pipron » sur la eks-akson (tre sprita versaĵo!); nekrologoj pri I. dia Zamenhof kaj Izrael Lejzerowicz; respondo de K. Kalocsay al s-ro Butler pri io-ujo; ktp. ktp. Intertempe aperis du pliaj numeroj.

Por konvinkiĝi pri la forpaso de la famo, La Rondo rekomendas ke oni petu lernejan knab(in)on skribi deklinian eseon pri Talleyrand, Castlereagh, Metternich aŭ Alexander I de Rusujo, ĉiu el ili bone konata homo de la Napoleona tempo, — la respondoj ricevitaj estos same senciaj kiel tiuj, kiujn la mondo ricevos post du-tri generacioj, kiam oni petos de lernuboj dek liniojn pri Churchill, Stalin, Roosevelt aŭ Hitler.

En Esperantobladet skribis s-ano H.A.R.: « Ni sekvu la alvokon de Zamenhof, ni rompu la murojn. Kiel? Per ago, per agado. Vi kredas, ke vi ne povas ion fari? Vi eraras, vi vere povas ion fari, kaj estas via devo fari tion. »

Esperantista publikigis interesan artikolon de Prof. Josef Hendrich pri artefarita lingvo laŭ la ideoj de Johan Amos Comenius (Jan Amos Komensky). I.a. Comenius opinis nebezonaĵo la verbajn finaĵojn (por la preterito li proponis antaŭmeti « ant », por la futuro « post ») kaj same la finaĵojn de la adjektivo. — Oni demandis nin, ĉu ni ne legis la artikolon « Ridindaj ludemuloj » en la sama gazeto, en kiu la verkinto atakas D-ran Manders kaj nian redaktoron pro io kio ekzistas nur en la imago de tiu artikolskribinto. Vere, ni legis la artikolon, amuzite ridis pri ĝi kaj — metis la gazeton en la kolektujon: estis ja evidente ke la redaktoro de « Esperantista » simple lasis mistifiki sin de iu el siaj legantoj, kiu riskis skribi pri io, kion li ne povis kompreni, ĉar ... li tute ne legis la libron de D-ro Manders.

\*\*\*\*\*

**VERDSTELAJ RADIOJ.**

— La franca ministro de nacia edukado donis en « Journal Officiel » de 21.8. respondon tre favoran por la ideo de lingvo internacia, responde al s-ro Lucien Amat el Toulon, kiu postulis la enkondukon de Esperanto en la lernejojn. En la sama respondo la ministro sin turnis kontraŭ Basic English. — 36 geseminarioj de la porinstruistina kaj porinstruista seminarioj en Besançon sekvas oficialan Esperanto-kurson nedevigan.

— 60 nederlandaj fervojistoj-esperantistoj vizitis la 7-9-10 Parizon, por reciproki la majan viziton de francaj fervojistoj-esperantistoj en Amsterdam. Regis granda entuziasmo, kaj okazis oficiala akcepto ĉe s-ro Flouret, prez. de la administra konsilantaro de SNCF (franca ŝtata fervoja societo), kun ĉeesto de reprezentanto de la nederlanda ambasado.

— Unio de Esperantistaj Katolikoj Italaj kunvenis la 7-9.11 en Romo, kie okazis sankta meso, paroladoj ktp. Karto eldonita okaze de la kunveno montras krucon kaj verdan stelon super la katedralo de S-ta Petro.

— El Britujo oni raportas novajn Esperanto-klasojn (kursojn) en Alfreton (15 p.), Bristol (20), Dunstable (18), Huddersfield (23), Ipswich (28 kaj 23 p.), London, St. Helens kaj Sunderland. Kurso por 30 germanaj militkaptitoj en Debach (Suffolk).

— La Junula Sekcio de GEA aranĝos post pentekosto 1948 (18.-24.5.) internacian ĵurnal-kunvenon en la Alpoj (usonanoj). La partopreno kaj la vojaĝo interne de Germanujo estos senpagaj por eksterlandaj junuloj. Adreso: Germana Esperanto-Asocio, Postfach 47, München 23.



« Ankaŭ vi devas lerni Esperanton! »

Tiun admonon (en norvega lingvo) multnombra publiko povis legi sur aŭtomobilo kiu partoprenis en festproceso okaze de la Nacia Festo en Fredrikstad. La sinjoro maldekstre (en la aŭtomobilo) estas nia fervora samideano Torstein Andersen. Simile oni propagandis ankaŭ en la norvega havenurbo Bergen, nome per aŭtobuso portanta la terglobon kaj la tekston: « Ĉiuj rasoj, ĉiuj popoloj parolas sen interpretisto. Lernu Esperanton! » Pli ol 70.000 personoj rigardis la procesion. Tia maniero de propagando meritas imiton en aliaj urboj kaj landoj.

E. Z. Obolo :

Tiuj damnitaj Nederlandanoj!

Nia samideano Siks kaj nia samideanino Siksta.

Hans havis kuzon, kiun ni volas nomi Siks, kaj Maks estas bofrato de Siks. En la unua tempo Siks intime kunlaboradis kun Hans en la rezista movado, sed ne kun Maks, kvankam li bone sciis kion Maks volas efektiviĝi.

Siks loĝas en sia urbo en domo apud tiu de siaj gepatroj. Sed li ne deziris havi sian nomtabuleton sur la dompordo, por ke oni ne diru ke, pro la manko de loĝloko en la urbo, li loĝu kune kun la gepatroj.

Fakte, post nelonge la Gestapo interesiĝis pri li kaj postulis en la urba policoficejo lian adreson: li estas manufakturisto, antaŭ kelkaj jaroj li edziĝis kaj havis unu infanon. «Ho,» diris la deĵoranta policisto, «vi volas paroli kun s-ro D.B., li loĝas apud la granda placo, havas unu infanon, posedas butikon por sinjoraj modoj kaj edziĝis antaŭ kelkaj jaroj.»

Tiu eraro de la Gestapo estis tre bonŝanca por Siks; ĉar eĉ, se la Gestapanoj pli poste estus eksciintaj pri sia eraro, ili ne baldaŭ reirus por serĉi la veran Siks, ĉar tiuکه ili kompromitus sin mem antaŭ siaj ĉefoj.

Siks do estis libera fari kion li volis. Li do iom post iom refondis la lokan rezistan grupon, prenante novajn kunlaborantojn, ĉar ne eĉ unu el la malnovaj li volis rehavi. Unue li rekrutis fidindan personon el la ĉirkaŭaĵo de la flughaveno, ĉar tio estis laŭ lia opinio plej necesa.

Nur post la milito Siks konatiĝis kun pli ol kvardek kunlaborantoj, kaj kunlaborintoj de kunlaborantoj. Ili ĉiuj laboris en aŭ proksime de lia urbo. En aliaj urboj oni agis simile.

Kiam Siks estis organizinta sian servon, li informis Maks, kiu donis la necesajn informojn kaj instrukciojn, por ke la kurierino de Siks, kiu ricevis la nomon Siksta, povu ekoni la vojkurierinon al Amsterdam. Ankaŭ tiu Siksta estas esperantistino.

Siks tute ne ŝatis esti konata al la vojkurierino. «Tio ne estas necesa,» li diris. Jam tuj Siks povis transdoni laboron, tiel

«Nia Revolucio certigos al vi Pacon, Abundon kaj Liberecon!»

deklaras «Révolution», la monata organo de la Integralista Movado en Parizo.

Nia movado — ĝi diras — laboras por la adopto de integralismo (integrala = kompleta; integralista = kompletista, ĉion-entenanta) por la homa socio.

Integralismo estas socia doktrino kompleta, celanta la emancipon kaj disvolvon de la individuo laŭ nuntempaj sciigoj.

Bazita sur naturaj leĝoj, ĝi ebligas filozofion humanistan, kiu estas sintezo de spiritualismo kaj de materialismo, el kiu fontas moralo racia, kaj fundamentaj principoj de libereco kaj justeco.

Rekomendo precipa estas: nuligo de la suvereneco de ŝtatoj; forigo de landlimoj kaj de politika karaktero de nacioj;

adopto de lingvo komuna ĉe ĉiuj popoloj; federala strukturo, kies administrantaro estas elektota per voĉdonadoj kaj per stadioj, prenante kiel bazon la lokan sferon de agado;

sistemo ekonomia kolektiva, sed liberiga, konkukanta al malrapida de dungatoj kaj dungantoj, dank' al kio ĉiu individuo havas eblon mem determini sian pozicion kaj preni plej multe da ĉio, metita de la progreso al la dispono de la homaro;

koncepto kaj aranĝoj pli naturaj rilate al seksaj demandoj kaj al la starigo de familio, ankaŭ pri produkto de supera homaro;

metodoj pedagogiaj kaj novaj programoj, ebligantaj al ĉiu individuo facile akiri generalan altgradan kulturon;

kuraĝa planado de urboj per moderna tekniko, ebliganta al ĉiu ĝui avantaĝojn kaj de la urbo kaj de la kamparo sen suferi pro iliaj respektivaj neoportunaĵoj;

fine, rekomendante paralelan arangon por la tuta organizo de la socio, ĝi antaŭvidas plenan kaj samtempan aliformadon de ĉiu sfero de homa aktiveco.

La Integralista Movado, starigita en Francio jam de unu jaro, kun la celo apliki la integralismon, uzas plurajn formojn de agado: eduka, politika, sindikata, efektiva, dissolva. Ĝi propagandas favore al kunlaborado de ĉiuj grupoj havantaj la saman ideon.

Trad. E. E. YELLAND.


\*\*\*\*\*

ke la anstataŭanto de Maks en Amsterdam ne povis kompreni, kiel tiu Siks, kiun li tute ne konis, jam tuj havis tiel gravajn informojn kaj desegnojn, eĉ tiel ke oni opiniis: «Ĉu tio estas fidinda?» Kiam li estis parolinta kun Maks, nur tiam ĉio klarigis.

Esperanto-lecionoj kiel kamufilaĵo.

Mi jam diris, ke ĉiuj sciigoj alvenis en la domo, kie Siks havis sian korespond-adreson. La sinjoro en la butikoj ne sciis, kio troviĝas en la pakajoj kaj leteroj, kiuj tie alvenis; ankaŭ tio ne estis necesa. Li nur sciis, ke la pakajoj kaj leteroj estas por iu bona afero. Li portis ĉion al Siksta, aŭ Siksta prenis ĝin ĉe li. Ŝi korektis la laboron laŭ antaŭaj indikoj de Siks, preparis ĉion kun li, kaj kiam ĉio estis tutpreta, ŝi portis ĝin al la stacidomo, kie la vojkurierino ĝin akceptis.

La desegnoj kaj maŝinskribitaj informoj, portantaj la regionnumerojn de Siks, estis metataj inter du foliojn de «Signal», en tiu tempo famkonata germana-nazia propagando revuo ilustrita, kaj Siksta kungluis la randojn de la du paĝoj, inter kiuj troviĝis la valora materialo. La vojkurierino do ricevis nur bele rilatan germanan revuon «por sin distri dum la vojaĝo». Ĉio iris al Amsterdam, kie ĝi estis fotografata kaj forsendata. Daŭris maksimume dek tagojn, ĝis tiuj informoj alvenis en Londono. Urgaj informoj iris perradie; aliaj per



360 000 fulmoj en ĉiu sekundo.

Sen fulmotondroj la vegetacio sur la terglobo estus nur mizera; ĉar estas la fulmotondroj kiuj alportas la plej frukto-donajn pluvojn. La elektra forto de fulmotondro dependas ĉefe de la akumuligo de interfrotantaj akvogutoj. La moviĝo de la akvogutoj kaŭzas ke la elektra kampo, kiu konstante ĉirkaŭas la teron, ekhavas pli kaj pli altan tension, kiu malsargiĝas per la fulmoj.

En la «fulmotondra kuirejo» de la tero pretiĝas ĉiujare proksimume 16 milionoj da fulmotondroj, tio estas 44 000 ĉiutage. En ĉiu sekundo proksimume 360 000 fulmoj zigzagas trans la terglobon.

La plej multaj fulmotondroj okazas en Javo; tie oni kalkulas jare 220 tagojn kun fulmotondroj. Aliaj regionoj riĉaj je fulmotondroj estas la interna Kongoŝtato, Suda Meksiko, Panamo kaj Centra Brazilo. Malriĉaj je fulmotondroj estas la Saharo, Arktiko kaj Antarktiko, kie okazas meznombre nur du fulmotondroj en unu jaro. Tial la Saharo estas la plej malfekunda parto de Afriko. Estis la manko de fulmotondroj kaj pluvoj kiu kaŭzis la stepigon kaj sabligon de tiu giganta teritorio.

La tensio de unu sola fulmo povas atingi 100 milionojn da voltaj. Laŭ tio oni povas kalkuli, kiom fantazie altaj elektraj tensioj malsargiĝas ĉiutage per la fulmotondroj super la terglobo.

kurieroj tra Svislando, Svedujo kaj Hispanujo.

Siksta ofte vizitis Sikson «por ricevi Esperanto-lecionojn» kaj la t.n. malgranda publiko, kiu sciis tion, sciis ankaŭ ke la studado de la lingvo Esperanto mem ne estis malpermesita, kaj oni priridis la ordonojn rilate al la esperantistaj organizoj. Ĉar Siks estas bone konata esperantisto en la urbo, neniu pensis pri tio ke tiu esperantisto ankaŭ povas fari ion alian ol doni Esperanto-lecionojn.

Siks do starigis novan ID-servon (informservon) en sia urbo kaj ties ĉirkaŭaĵoj, kaj Maks estis la landa ĉefo. Tiu nova ID-servo nomiĝis «Sekreta Servo Nederlanda», kaj sub tiu nomo ĝi apartiĝis de la OD (ordoservo) kaj de aliaj. Ĝi laboris multe pli bone ol la malnova. Arestadoj okazis tre malofte. Ĝi okupis sin nur pri tia laboro. SSN fariĝis memstara. Same okazis al la batalgrupoj, kiuj sin nomis KP. Ankaŭ la organizo por submergiĝintoj apartiĝis kaj nomis sin LO. Ni plue konis la OD kaj RVV (konsilantaro rezistada), kiu lasta estis la batalgrupoj, i.a. la grupo Alberto, kiu sukcese agadis sur la Zelandaj insuloj. Nia SSN transdonis en ok monatoj dek mil informojn al Londono, kaj en la tempo, kiam la sudo de Nederlando estis jam liberigita kaj la nordo ankaŭ ĝemis sub la germana jugo, la SSN eĉ akiris pli ol dekkvin mil informojn, kiuj estis transdonataj al la pli proksima inform-oficejo alianca en Eindhoven.

angla-franca miksidion) pri Esperanto. pri Zamenhof, pri la interna ideo, pri la 32-a Universala, kiun partopreni mi ŝipveturas, kaj pri l' estonta tuthomara interfratiĝo.

Siaj — nun bluaĵ — okuloj brilas. La larĝaj orelokonoj estas atentemaj. La nazeto revas, kalkulante la aperintajn steletojn sur la ĉiela firmamento. Du profundaj sulkoj vertikale distranĉas la reliefan frunton.

Enrave ŝi flustras: — Dankon, sinjoro profesoro! Dankon pro la konversacio! Verdire, vi estas mia plej bona amiko, kvankam iom ... troaĝa. Multon mi lernis de vi.

Kaj kiam mi prezentis al ŝi mian aŭtografan albumon, ŝi enskribis: «Triumfon al Esperanto!»

Pri tiu ĉi enskribo mi fieras: Mi varbis la koron de ĵuna princino!

Stradivari-Jubileo.

En Cremona (Italujo) oni starigis komitaton por rememorigi, dum la jaroj 1948-49, la 300-an datrevenon de l' naskiĝo de la fama liutisto Antonio Stradivari, per serio da grandaj internaciaj liutaj manifestacioj muzikaj kaj artaj. La komitato jam kontaktiĝis kun la plej famaj liutistoj kaj muzikistoj de multaj nacioj, al kiuj ĝi rekomendis la arangon de subkomitatoj, por kolekti monsumojn por monumento al la granda majstro, en lia naskiĝurbo Cremona. Orkestro-direktoroj kaj muzikistoj estas petataj donaci malgrandan procenton de siaj enspezoj por la monumento. La komitato invitas ĉiujn, kiuj volas, partopreni la Ekspozicion kaj Manifestacion en Cremona, kiuj komenciĝos en aprilo 1948. Adreso de la komitato: Comitato Esecutivo Stradivariano, presso Ente Turismo, Galleria XXV Aprile, Cremona.

Ekspozicio kiel rezulto de anonceto en Heroldo.

«Certe estas tre interese vidi la rezultaton de unu anonco por peti konsolleterojn al f-ino A. W. Geijtenbeek, kiu dum unu jaro kuŝas en sanatorio,» skribis al ni la patrino de f-ino G. Post anonceto en Heroldo de 1.5.47 ŝi ricevis dum unu monato tiom da korespondantoj, ke samideanoj en Zeist (Nederlanda) aranĝis per iĵ publikan ekspozicion (26.-27.9.), kiu velkis grandan intereson por Esperanto en la nomita urbo. Por nia malsana samideanino la multaj amikaj leteroj el la tuta mondo estis vera konsolo.

Mozaiko.

Eksperto por profito. La du plej bonaj piedpikaj ludantaroj de Irlando, Cavan kaj Kerry, renkontiĝis por decidi kiu estas la plej bona. Sed ne kredo, ke tio okazis en Irlando: ili iris al Usono, por ludi sur la «Polo Grounds» en Nov-Jorko. Kial? Eksperto por profito! Ili estus povintaj ludi sur la sportejo Croke Park en Dublin, antaŭ 80.000 rigardantoj. Sed prefere ili ludis en Nov-Jorko antaŭ nur 35.000 rigardantoj, ĉar ... la enirprezo en Nov-Jorko estis 50-oble tiel alta kiel ĝi estus en Dublin. Do, ili sukcesis laŭ financa vidpunkto. Bedaŭrinde ne la irlandanoj vidis la ĉampionludon sed la usonanoj, kaj oni povas forte dubi, ĉu eĉ personoj de irlandana deveno, naskitaj en Usono, komprenis la ludon, ĉar ĝi malsimilas al usona piedpilkado. (Vathis.)

Sinjoro Jenesepe. Usona soldato vizitis Parizon kaj estis admiranta de ekstere la faman katedralon de Nôtre Dame. En tiu momento edziĝproceso eniris la katedralon. Sin turnante al franco, la usona soldato demandis: «Kiu estas la edziĝonto?» La franco, kiu mem ne sciis, respondis: «Je ne sais pas.» — Iom da tempo poste funebra procesio forlasis la katedralon. Denove la usona soldato sin turnis al la franco kaj demandis: «Kiu mortis?» Kaj denove venis la respondo: «Je ne sais pas.» «Hm!» diris la usonano, «ĉu sinjoro Jenesepe ja ne longe eltenis ĉe sia ĵunedzino.» (Vathis.)

Skoto ŝparema. Ĉu vi ne jam aŭdis pri la skoto, kiu eniris butikon kaj petis funton da butero involvita en la hodiaŭa tagĵurnalo? (V.)

Pacpropagando dum milito ... en la Antikva Epoko. La Viena teatro «Die Insel» prezentis la komedion «Lysistrata» de la greka poeto Aristophanes, kiu sin turnas per trafa satiro kaj ironio kontraŭ la frenezo kaj krimeco de la milito. Li faras tion ĝuste en tempo, kiam en lia patrujo furiozas milito: la interfrata milito de Peloponezo. Oni imagu: Dum la milito li kondamnas militon, faras propagandon por la paco, kaj tamen li, verkinto de kontraŭmilita porpaca teatraĵo, pro tio ne estas ĵugata kaj persekutata, ne traktata kiel «ŝtatperfidulo». Kiom alte vere staris la antikva paganismo super la novpaganismo de la 20-a jarcento, ankaŭ en malbenplena memoro nia! (W. M.)

EKZAMENU VIN MEM!

Respondoj

al la demandoj en la pasinta numero.

- 96. J. A. Komensky mortis en Nederlando; li estas enterigita en la nederlanda urbeto Naarden.
97. Federacio de Laboristaj Esperantistoj; Flandra Ligo Esperantista; Flandra Esperanto-Instituto; Flandra Esperantisto.
98. Esperanto.
99. 1 avo kun edzino, 1 patro kun edzino, 1 filo kaj 2 filinoj, entute 7 personoj.
100. En 1987.

Novaj demandoj kaj taskoj.

- 101. Ĉu vi konas niajn verkistojn? Korektu la erarojn: Johano Baghy estas ĉeĥo; Alberto Grabowski estis bulgara; Stano Enghelm estas dano; D-ro Vallienne estas belgo.
102. El kvin respondoj elektu la gustan: Kio estas Meruo (Meru)? — 1. Speco de struto; 2. vulkano en orienta Afriko; 3. ano de sudamerika indiana gento; 4. nomo de faraono, vivinta en la 3-a jarmilo antaŭ Kristo; 5. mallongigo por Monaka Esperantista Radioamatora Unuiĝo.
103. Kiu itala urbo konsistas el persona pronomo kaj mola hararo teksebla, kaj samtempe el nombro kaj sufikso?
104. Kiu konata samideano fariĝos la 21-an de decembro 76-jara?
105. Korektu la jenan alineon, kiu enhavas 40 erarojn: Iam estis reĝon nomotan Dionizo. Tio rego esti tiom gruelo, ke oni nomi li thiranon. Li ciis, ke la popolo malamam lin, kaj tial li tihmis, ke li li mordigis. Sed li esti riĉa kaj logis en bella palaso. Grandan nombron de serfisto serfis al lin, kaj ili estis ĉiam breta por plenumas siaj ordenoj.

RIDO SANIGAS.

BOVAĴO.

En la restoracio «Al la Grasa Kulero», antaŭ nelonge, kiam iu gasto mendis ĉe nova kelnero ekstrakton de bovaĵo, ĉi tiu alportis al li ... glason da lakto.

STRANGE.

— Rakontu, kiel plaĉis al vi la prelego de la fama historiisto?
— Strange, mi devas diri: tiom da fentoj, kaj tamen tiom seka!

J. Kohen-Cedek :

Tra tri kontinentoj

(Daŭrigo.)

Princino de la ŝipo.

— Gilberte, venu ĉi tien!
— Bonvolu ... tien ĉi, Gilberte!
Tiajn alvokojn oni aŭdas konstante. Gilberte estas la plej ŝatata persono en nia ŝipo, de ĉiuj adorata kaj amata. Ĉiuj deziras ŝian apudeston, kun ŝi oni sentas sin feliĉa. Ĉiujn ŝi allogas, ravas; ĉiujn prisorĉis ĉi tiu ĵuna franca feino. «Princino de la ŝipo» oni nomas ŝin.
Gilberte estas ĉie kaj nenie. Jen transflritis ŝiaj heloraj bukloj sur la kapitana ponteto, jen trafumis ŝiaj grandaj okuloj la malhelon de la koridoro, jen aperis ŝia reliefa frunto en la mangosalono, kaj jen ekbrilis ŝiaj rozblankaj genuoj sur la ferdeko.
Ĉu ŝi estas belulino? Prijuĝu mem: katinmilda vizaĝeto kun revema esprimo; la nazeto suprenrigardanta, kvazaŭ kalkulanta la preterŝvebantajn nubetojn; lipetoj rozfoliaj, maldikaj, de orelo ĝis orelo — dum rideto; la oreloj — rozaj konkoj — ĉion deziras aŭdi, ĉion ensorbi; la okuloj — kun du satanetoj en la pupiloj — foje bluaĵ, foje grizaj, foje verdaj, laŭ la humoro. Sed la humoro — laŭ vetero; la vetero — laŭ la maro; la maro — laŭ vento; kaj la vento — treege ŝanĝiĝema ...
Gilberte estas gracia, plena de ritmo en siaj movoj. Ŝi ne iras, ŝi danĉflugas. Gilberte estas ridema, kolerema, facilanima dum seriozeco, enmelmigema dum gajhumoro. Ŝi estas jam plenaĝa fraŭlino kun siaj dek-kvar jaroj kaj ofte parolas kiel sperta virino kaj jam kapablas senkompe rompi korojn de diversajĝaj viroj. Senkonscie. Ho, ĉarma naiveco de la prapatrino Evo, supozinta per figfolio kovrokaŝi sian belecon!

— Gilberte, venu ludi je domeno!
— Gilberte, aŭskultu anekdoton!
— Gilberte, mi havas por vi enigmon! Enigmojn multe ŝatas ŝia sprita menso.
— Bonvolu demandi! Tuirigas ŝi al mi.
— Kiu marŝas kvarpiede kaj faras «haŭhaŭ»?
— Supezeble hundo.
— Ho, ŝajniĝas mi senluziĝon, oni certe jam demandis antaŭ vi mian enigmon kaj klarigis ĝin al vi. Tamen mi daŭrigos: Kiu marŝas kvarpiede kaj faras «miaŭmiaŭ»?
— La kato, se vi ne primokas min.
— Ho, Dio mia! gestas mi senespere, — nun mi estas certa, ke vi jam aŭdis tion, alie vi ne solvus tiel facile. Tamen mi daŭrigos: Kiu marŝas kvarpiede kaj nenion faras?
— ? ? ?
— Du anglaj oficistoj en Palestino; la tria estas la elektra ventumilo, kiu diligente funkcias ...
Gilberte jam estas preta forŝvebi.
— Restu! mi petas, — mi deziras babilu kun vi.
— Lasu min! respondas ŝi. — Via parolmaniero enuigas min: via franca lingvo sonas barbare laŭ la prononco, kaj vi enmiksas anglajn vortojn. Kiu ne parolas flue la francan, ne estas, mia opinio, sufiĉe instruita homo ... eĉ se oni titolas lin «sinjoro profesoro»!

Mi streĉas ĉiujn miajn intelektajn fortojn, la memorkapablon kaj la esprimpovon kaj rakontas al ŝi (tamen per mia

Nia Lingvo.

Kontraŭ la vorto «kampanilo».

De kiam mi eklernis Esperanton, estis en mia cerbo la vortoj «sonorilejo» kaj «sonorilturo».

C. CANUTO.

Margene.

KOPIO NE ESTAS KOPIO. El nederlanda Esperanto-revuo: «Kopio por la junia numero vi sendu antaŭ la 5-a de junio al la redakcio.»

ADJEKTIVA AŬ ADVERBA FORMO? En artikolo pri «Morala rearmado» en Heroldo troviĝis la frazo: «Tiuj multaj vizitantoj lernis pri la plano de la Oxford-grupo...»

KIAL SIA? El artikolo «Letero el Polujo»: «La glacio dum sia irado detruis ĉion renkontitan sur sia vojo.»

Esperanta Radio-Kalendaro. Ankoraŭ validas la Radio-Kalendaro publikigita en n-ro 16 (1075), kun la ŝanĝoj sciigitaj en n-ro 17.

La 9.10. TJO-anoj kantis en Esperanto kaj raportis pri la junular-kunveno en Ipswich, el la kimra stacio de BBC.

Lastmomente ni aŭdis pri ĉiutagaj Esperanto-elsendoj el Paris, komencontaj — dank' al klopodoj de s-ano Pierre Delaire — la 15-an de decembro, per ondo 41,21 m, je 17.15-17.30 h. GMT (18.15-18.30 nuna franca tempo = MET).

Aŭskultu al Radio Bratislava (kaj poste skribu al la stacio) la 14.12., je 19.15 MET (18.15 GMT), ondo 298 m, kvaronhora Esp.-programo okaze de la 88-a reveno de la naskiĝdato de D-ro Zamenhof.

Ni recenzas.

Marika Dragona: La reala vivo de mia Sinjoro kaj Savinto Jesuo Kristo. 123 p., 15 x 22 cm. Prezo egalvaloro de unu usona dolaro.

Ci tiun libron oni povas rigardi el diversaj flankoj kaj vidpunktoj, oni povas akcepti aŭ akre rifuzi ĝin; sed oni ne povas nei ke ĝi estas libro kun multaj pensoj, kaj pensiga.

La titolo estas erariga. Envere la aŭtorino tiras paralelon inter kristanismo kaj socialismo, pli ĝuste komunismo.

La aŭtorino bedaŭras ke la gvidantoj de l' komunismo, anstataŭ persekuti la religion, ne uzas ĝin kiel potencon armilon kontraŭ siaj malamikoj.

Laŭgramatike la libro estas malforta. Precipe ofta estas erara forlaso de subjekto, dum en multaj aliaj frazoj la subjekto nenecese estas ripetita.

La aŭtorino mem, kiu plenumis la oficon de sekretariino de Tesalonika Esperanto-Ligo, estis pro siaj ideoj arestita kaj kondamnita je morto.

J. v. R.

Novaj Esperanto-gazetoj.

Jen la adresoj kaj pli detalaj indikoj pri la gazetoj, jam menciitaj en n-ro 17 (1076): Bahaaĵ Informoj.

FLE-Amiko. N-ro 1. Eldono (presita) de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj FLE por neesperantistaj amikoj.

Internacia Esperanto-Servo de Aŭstrio. Eldonata de Aŭstria Laborista Esperantistaro, Neutorgasse 9, Wien I. N-ro 1, sep multobligitaj paĝoj.

Interstena Ligileto. N-ro 1, sept. Adreso: Korespondanta Centro, Köping, Svedujo.

Jurnalisto. Ĉina revuo «provizore ĉiumonata». N-ro 1. Adreso: P.O.B. 115, Ĉengtu, Szeĉuan, Ĉinio.

Kristana Frataro. Organo de Int. Kristana Frataro. N-roj 1 (julio) kaj 2 (oktobro). Adreso: 21 Mitchell Road, Palmers Green, London N. 13, Anglujo.

La Esperantista Laboristo kun Le Travailleur Esperantiste. Nova serio n-roj 2-4, marto-aŭg. Presita. Adreso: 34, rue de Chabrol, Paris 10.

La Ponteto. Organo de la Franca Asocio de Protestantaj Esperantistoj, J. Tuffier, 160 rue de Paris, Boulogne (Seine), Francujo.

La Suda Stelo, of. organo de Jugosl. Esp.-Federacio. N-ro 1, novembro. 8-paĝa, presita. Adreso: La Suda Stelo, Amruševa 5/1., Zagreb, Jugoslavio.

La Tventra Bulteno. Sciigoj pri la Esp.-movado en Almelo, Enschede, Hengelo. N-ro 1. Tri multobligitaj paĝoj. Adreso: N. Wolters, Bornebroeksestr. 89, Almelo, Ned.

Meteoro. Neregula multobligita informilo de la Esperantista Klubo en Tanvald, Ĉsl. New Zealand Esperantist. N-ro 60, jan. 1947. — 4 p. presitaj. Adreso: F-ino Joyce Wilson, 6 Clifford St., Karori, Wellington W. 3.

Renkonten al vivo. N-ro 1, julio. Multobligita, 2-paĝa. Bulteno de la esperantistoj en MLĀJ (Franca Asocio de Junulgastejoj). Adreso: André Albault, 49 rue Battești, Reims, Francujo.

Tea. Itallingva, multobligita bulteno de Asocioj Esperantista Triestina, Corso Garibaldi 2, II., Trieste.

TEJA. Informilo de Tutmonda Esp. Journalista Asocio, Värmlandsgatan 18, Göteborg, Sved. — Multobligita.

Vegetara Revuo. 4-paĝa provnumero, multobligita. Adreso: Chr. Houggaard, St. Blichersvej 43, Aabyhøj, Danlando.

Al la hispanaj esperantistoj.

LEA-Komitato de SAT en sia agado por helpi la starigon de LEA en tiuj landoj, kie ankoraŭ ne ekzistas LEA, konsiderante, ke grava parto de la hispanaj laboristaj esperantistoj ekziliĝis pro politikaj cirkonstancoj en sia lando, proponis kreadon de provizora LEA hispana inter rifuĝintoj.

Dezirata korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn kun ĉiuj landoj. F-ino Janine Cochet, 6 rue de Colmar, St-Quentin (Aisne), Francujo. — Certe respondos.

Sendu al mi 20-200 poŝtmarkojn el via lando, vi ricevos samkvante kaj samvalore francajn poŝtmarkojn. F. Vais, 19 rue de Verdun, Carcassonne, Francujo.

ANONCETOJ

Naskiĝo Kopasz. Al ges-roj D-ro Kopasz, UEA-fakdel. en Szeged, Hungarujo, naskiĝis la 3.10. filineto Agnes. Koran gratulon!

Letervesperon por propagandi Esperanton inter novaj grupoj arangos nia klubo, meze de marto 1948. Gesamideanoj skribu multnombro, ilustritajn poŝtkartojn kaj leterojn. Certe respondos. S-ino Anna Kincaid, korespondanta sekretario, 7034, N. Charleston Ave., Portland 3 (Oregon), Usono. (44)

Informo dezirata pri Johannes Mücke, policano, antaŭmilita adreso: Trachenberger Str., Dresden, Germanujo. Bonvolu skribi al lia malnova korespondanto R. F. Vaughan, Sandakan, B.N. Borneo.

Germanoj atentu! Germanoj, kiuj skribis al Hungarujo, ne povas ricevi respondon, ĉar el Hungarujo ankoraŭ ne funkcias poŝta servo al Germanujo.

Kio estas Pensologio? Broŝureto sendota senpage, kun folio La Vivo Transformita, laŭpete al (H) Hipsley, 17 Abbots Road, Birmingham 14, Angllando. — Povo sukcesi kontraŭ 3 int. resp.-kuponoj. «Traktaĵo-rekomendinda kaj riprensinda, kun instruoj tre bezonata en la nuna tempo!» (British Esperantist). Hipsley, kiel supre. (42)

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Loonopzand, Nederlando. (45)

Surduloj. La Brita Asocio de Surdetuloj ekkompilas tutmondan registron de organizaĵoj (asocioj, kluboj ktp.) de tiuj, kiuj estas perdintaj aŭ perdantaj la aŭdkapablon, celante al internacia kunlaborado kaj korespondado. Por tiu celo, kaj por montri la utilon de Esperanto, bv. sendi scigon kun detalaj de viaj lokaj naciaj organizaĵoj por surduloj, al: T. E. Cottam, 3 Riversdale Terrace, Sunderland, Anglujo.

Halo Okcidento kaj Ameriko! Ĉeĥoslovaka beletristo (35-jara) deziras korespondi pri temoj de nuntempa vivo, krom politiko. Mi atendas longajn leterojn, samajn garantiante. František Zima, Horna Stubna, Ĉeĥoslovakio.

S-ro A. v. d. Hoeven, komercisto, Z. W. Buitensingel 101, Hago, Holando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Interŝanĝas interesaĵojn, poŝtmarkojn (nestampitajn) ktp.

Junaj danaj geedzoj deziras korespondi kun junaj eksterlandaj geedzoj. S-ro Peter Sørensen, Skolegade 25 B II, Odder, Danlando.

Georg Lisbjerg, Udsigten 23, Kolding, Danlando, 31-jara, deziras korespondi kaj interŝanĝi naciajn esperantlingvaj gazetojn, revuojn, turistikbroŝurojn ktp.

Dezirata interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun ĉiuj landoj. Certe respondos. La anonco ĉiam validas. S-ro O. Andersen, Ostervaenget 1-I, Odense, Danlando.

Policianoj en CSR deziras korespondi kun policianoj en la tuta mondo, aŭ kolektive aŭ unuope. Respondo garantita. Skribu multnombro al: Esperanto-kurso S.N.E., Stalingradska 10, Ĉeb, Ĉeĥoslovakio.

José Tuset, Apartado 70, Manresa (Barcelona), Hispanujo, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun gesamideanoj en ĉiuj landoj.

Arduino Merante, Via d'Azeglio 10, Cannelli (Asti), Italujo, interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Fraŭlo F. Schouten, Belgische str. 73, Zaandam, Nederlando, deziras korespondi kun ĉiuj, el ĉiuj mondpartoj, precipe kun fraŭlinoj.

Dezirata korespondi kun samideanoj el ĉiu lando pri ĉia temo. 32-jara studanto de kontoscienso. S-ro G. A. Fitzpatrick, 23, Deynecourt Gardens, Wanstead, London E. 11, Anglujo.

S-ro Gunter Rieckhoff, Dunebergerstr. 11, (24a) Geesthacht, brita zono, Germanujo, 18-jara, deziras korespondi pri ĉiu temo.

Framasonoj kaj kremacistoj interrilatu kun s-ro K. Barthel, Wöhlerstr. 14, Frankfurt a.M., Germanujo.

Abelbredistoj! Mi volonte korespondus kun abelbredistoj el la tuta mondo. Respondo garantiata. A. Dumarque, lernejestro, Noeux-les-Mines (Pas-de-Calais), Francio.

Internacia Kongreso de Esperantistaj Maristoj okazos dum printempo en Francujo. Petu informojn! Sendu poŝtkartojn amase! S-ro Delamare, 32 str. Alex-Legros, Fécamp (S.-Inf.), Francujo.

Vian varbilon por Esperanto!

Varbstampilojn ..... 4 ŝil. Varblumbildojn ..... 12 ŝil. Tablo-standardojn ..... 12 ŝil. Insignojn ..... 1 ŝ. 6 p. kaj ĉiujn presklišojn mendu ĉe WALDEMAR REINHOLD Esperanto-varbiloj Johanniterstrasse 84 (22a) DUISBURG, GERMANIO. Vian pagon direktu al U.E.A., Rickmansworth, Anglujo.

Al la adreso de Radio-amatoroj.

S-ro E. Urban, Bulharska 7, Praha 13, Ĉeĥoslovakio, skribis al ni:

Por penetrigi Esperanton en la plej parenca, senliman fakon — radio-komunikadon, mi petas la tutmondan esperantistaron sugesti al sialandaj radioamatoraj ligoj kaj al apartaj radioamatoroj-mallongonduloj nepran kaj tre utilan uzadon de Esperanto en interrilatoj dum QSO en etero kaj ĉe interŝanĝo de QSO-kartoj. Mi invitas ĉiujn radioamatorojn-mallongondulojn, ĉiam menci Esperanton dum QSO kun sovietaj radioamatoroj el zono UAl kaj sur QSO-kartoj al Sovet-Unio. Anatol Szymajtnikov (voksigno: UAIBF), Vosstania d. 53, K. 25, Leningrad 14, USSR. — Li skribas: Mi deziras, ke ĝi estu publikigata por sola celo: plidivastigi Esperanton inter radioamatoroj de la tuta mondo.

Libroj eldonitaj post la milito

Table with 2 columns: Book title and price. Includes titles like 'La forto de V vero', 'La vidvino', 'Sep Vangofrapoj', etc.

Table with 2 columns: Book title and price. Includes titles like 'La sama, bindita', 'Lorenz: Al la Deka Brazilo Kongreso de Esp.', etc.

La prezoj estas en guldenoj. Por sendkostoj aldonu 10%, minimume gld. 0.10. Ĉe mendo por minimume 10.— guldenoj (Nederlanda 5.— gld.) ni liveras, ne kalkulante sendkostojn.

Libro-Servo de HEROLDO DE ESPERANTO, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando